★

# Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

## Tradukado de Gvidilo tra Brno

Laboro pri tradukado de la gvidilo. Mi petas ĉiujn, kiuj jam ion tradukis, ke vi sendu vian tradukon al mi ĝis lundo la 12-an de februaro ĝis la 14-a horo. Mi kunigos ĉiujn tekstojn kaj sendos ĝin al vi. Merkrede ni diskutu pri jam farita traduko. Se vi povus, bonvolu alporti vian porteblan komputilon (notebook). Se iu volas kontribui, ne gravas, ĉu li jam ion tradukis. Se vi havas, ne forgesu alporti vian libron.
Kion ni tradukas? Ni tradukas *Brno – průvodce městem*. La libro estas aĉetebla en TIC Brno, la prezo estas 130 CZK. Vidu ĉe https://www.darkyzbrna.cz/cti-brno/pruvodce-brno/.
Ĉeesta programo, ĝi ne estos registrata
**Gvidos:** Milan Kolka

**Lingvo:** Esperanto

**Kiam:** la 14-an de februaro 2024 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

**Kie:** Občanský klub, **Hybešova 65a**, Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybeŝova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la mapon. La plej proksima tramhaltejo estas Václavká (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)

★

## Ni rekomendas

- Nova libro de Oldřich Arnošt Fischer: **El Mirinda Mondo de Kaktoj (*Cactaceae*)**. En la libro oni trovos kolorajn fotojn de 160 kaktaj specioj kaj koncizajn datumojn pri iliaj naturaj trovlokoj, adaptado al malfavoraj vivkondiĉoj. signifo, historio de kakta kultivado kaj personecoj, kiuj okupiĝas(is) pri la kaktoj. Kaktista vortareto kun kelkaj esperantigitaj sciencaj nomoj estas aldonita. Por Brnanoj nur **239** Kč! Vi povas mendi ĉe mi aŭ ĉe la aŭtoro, la librojn post mendom mi prenos al nia renkontiĝo.
- La 3an — 10 de aŭgusto 2024 **Universala kongreso**, Aruŝa, Tanzanio. La plej favora prezo nur ĝis la jarfino.

★

## Programo en februaro

La 21-an **Vortprovizo por ĉiĉeronado**, rete per Skajpo
La 28-an **Jarkunveno de membroj**, Klubejo Hybešova 65a, Brno

## Programo en marto

La 6-an *Ankoraŭ ne agordita*, rete per Zoom, komuna renkotiĝo kun klubo Glivice
La 13-an **Teĥnikisto Ludvík Očenášek (1872 – 1949) kaj lia neostenta patrismo** – Oldřich Arnošt Fischer, Klubejo Hybešova 65a, Brno
La 20-an *Ankoraŭ ne agordita*, rete per Skajpo
La 27-an *Ankoraŭ ne agordita*, Klubejo Hybešova 65a, Brno
Mi petas vin, ke vi jam pripensu, kiel vi povas kontribui al la programo dum venontaj monatoj, precipe en marto. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos. Ne forgesu, ke nia programo povas esti nur tia, kiun mi ĝin preparos.

★

Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (https://www.esperantobrno.cz/index.php/eo/aprogramo),
- na naší stránce na Facebooku (https://www.facebook.com/esperantobrno/)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brno)

Nahrávky proběhlých přednášek a některých dalších programů naleznete na našem kanálu na Youtube (https://www.youtube.com/@esperantobrno).

Milan Kolka
prezidanto

(Noto: bonvolu ne uzi retpoŝtadreson invitiloj@esperantobrno.cz por respondoj, ĉar ĝi funkcias kiel nigra truo. Se vi sendus ion ajn al ĝi, la mesaĝo atingus nenies retpoŝtkeston.)